

Joachim Ringelnatz,
Mizera herbeto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Okzalo sola apud la
fervoja trako sidis,
kaj, salutante, multe da
entrajnaj homoj vidis.

Kaj polv-kovrite glutis ĝi
la fumon sur la digo;
ne estis ĝi ja sen konsci',
la febla, ftiza tigo.

Aliĝi kaj foriĝi nur
la trajnojn vidis ĉiam,
vaporo-ŝipon vidis sur
la ocean' neniam.

*Traduko de la Germana poemo "Arm Kräutlein" de JOACHIM RINGELNATZ (Hans Bötticher, *1883 – †1934) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-09.*

MR-157-3 / Arg-529-1052 (2010-03-26 11:20:34)

Pri la verkinto Joachim Ringelnatz vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Ringelnatz.